

esperanto USA

The ELNA Newsletter: News of the language problem and Esperanto as a possible solution ☆ 3/1997

Look inside for:

English vs. Esperanto	2
Passion and Patience	4
Esperanto meeting in Okemo	4
Pasporto al la tuta mondo	5
Recenzoj (<i>Esperanta muziko</i>)	6
La Estraro	7
Telefon-kunvenoj	8
Regiono kaj loko	8
Leteroj	9
Konkurso	9
Esperanto in the media	10
English as she is spoke	11
Kalendaro	11
Anoncetoj	11
Menciinde	11

PROSPERAN
1998!

Saluton ĉiuj!

After outstanding National Conventions in Detroit and San Francisco, we think we have another excellent one coming up in 1998. Montreal has invited us to join the Canadian national convention (as well as the Canadian and Montreal youth group conventions) next year, Saturday, July 25 to Monday, July 27. We are very pleased that **Normando Fleury** will organize matters from the local side. Normando has a great deal of experience with conventions: he has arranged several conventions and the highly-applauded Okemo meetings for the past three years. Watch your mail for details.

It's getting close to the end of the year, which means it's time to renew. You should have already received your renewal form in the mail (if not, please contact the Central Office or me immediately). I hope you still want to support ELNA and our efforts to spread Esperanto. And perhaps you will consider upgrading your membership from a regular membership to Sustaining or Patron. Every bit of backing helps us keep up our work. (And if you've already sent in your check with just a regular membership, send the difference in to the CO with a note that you want to help more.)

For example, we have just finished appointing a Publicity Committee. We finally have a group of volunteers specifically tasked with getting the word out! Previously we've had a variety of individual efforts, or some work from the badly-overworked Central Office, or—too often—nothing at all. If you have real-world publicity experience, and you'd like to help, please contact **Grant Goodall** (ggoodall@utep.edu or check the *Adresaro* for other addresses).

We have also appointed the Nominating Committee for next year's elections.

If you want to recommend someone for nomination, contact **David K Jordan** (dkjordan@ucsd.edu). You can also directly nominate someone by submitting five signatures from ELNA members to the Nominating Committee by February 15.

Congratulations to **Kent Jones** for his successful conference call with Esperanto instructor **Boris Kolker** and the upcoming call with **Michele Gregory**. And **Sherry Wells** has conducted a conference call between local groups. E-mail is not the only way to practice your Esperanto with many people at once; I think the telephone will be used more and more to help bring our scattered membership together.

Our thanks to an anonymous donor who gave \$30,000 earlier this year. We goofed and managed to leave this out of our annual list of donors, but we do appreciate it very much.

Thanks to everyone who helped at the Boston International Festival: **Steve** and **Lucy Brewer**, **Martha Pauig**, **Donner Lohnes**, and especially **Bill Harris**. We gave out 150 brochures, 180 Handy-Dandies, and we ran out of Lesson 1s!

Last, congratulations and an Ege Bone! to:

Edwin Grobe, for a positive flood of publications reviewed in the past few issues of *Esperanto*.

And **Charlotte Kohrs**, who was named an Honorary Member of ILEI (International League of Esperanto Instructors). Charlotte helped found *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo* (Children Around the World).

Thanks!

David WOLFF, President

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530,
USA/USONO
tel: 510/653-0998; fax: 510/653-1468;
e-mail: elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: David T Wolff
Vice President/Vicprezidanto: Derek S Roff

Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: Anna Bennett
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Steven G Belant, Randy Dean, Mike
Donohoo, Thomas Eccardt, Grant T
Goodall, D Gary Grady, Dorothy B
Holland, Reginald Jaderstrom, R Kent
Jones

Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo: Miko Sloper
Vice Director, Central Office/Vicdirektoro
de la Centra Oficejo: Ionel Oneț

esperanto USA

Newsletter published by the
Esperanto League for North America
Novajletero publikigita de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 33, No. 3
ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Ionel Oneț
tel: 510/653-0996; fax: 510/653-1468;
e-mail: ionel@esperanto-usa.org

Materials for **esperanto USA** should
be sent to/Materialojn por **esperanto
USA** oni sendu al: **esperanto USA**, PO
Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA/
USONO, or by e-mail/aŭ e-poŝte al: **e-
usa@esperanto-usa.org**.

The opinions expressed in this news-
letter are those of the authors, and don't
necessarily represent the point of view of
ELNA or its newsletter/La opinioj esprim-
itaj en ĉi novajletero apartenas al la aŭto-
roj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton
de ELNA aŭ ties novajletero.

Reprinting materials from this newsletter
is permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted mater-
ial is sent to ELNA/Estas permesate re-
aperigi materialojn el ĉi novajletero, kon-
diĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke
oni sendu ekzempleron de la republikig-
ita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por
la sekva numero: 30.01.1998.

English vs. Esperanto

Tuj post kiam la antaŭa numero de *Esperanto USA* iris al la presejo atingis nin e-poŝte la jena mesaĝo, kiun ni aperigas sen ajna ŝanĝo: "Leganta la ĵurnalojn de la ELNA, mi ne povas ignori ke la lingvo de la rubrikoj estas plejparte en la angla kaj ne Esperanto. Kial ĉi tiu fakto estas vera? Oni pensus ke Esperantistoj, kiel Lojbanistoj, ne scipovas legi ilian lingvon! Mi nur estas komencanto kaj ne parolas aŭ skribas esperanton flue, sed mi certe povas legi ĝin bone. *El Popula Ĉinio* ne estas en la ĉina, kaj *Monato* ne estas en la nederlanda -- kial la ELNA skribas en la angla?"

Ricevinte la antaŭan numeron de *Esperanto USA*, la aŭtoro de la ĉi-supraj linioj sendube havis malagrablan surprizon, se enkalkuli ke ĝi estas plejparte en la angla. Ankaŭ en ĉi numero la angla ne mankas kaj ne senkiale. Eble la fakto ke "Esperanta" periodaĵo uzas nacian lingvon bezonas iom da klarigo, ne nur por la aŭtoro de la ĉi-supra citaĵo.


Ĉiu periodaĵo havas certan cel-legantaron, kiun la redaktoro neniam rajtas neglekti. Periodaĵoj aperas por la legantoj kaj ne por la aŭtoroj de sia enhavo. Laŭ niaj modestaj eblecoj ankaŭ *Esperanto USA* submetiĝas al tiuj reguloj. Laŭ sia Statuto, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) devas eldoni minimume kvar fojojn jare novajleteron. La novajletero de ELNA celas unue la membraron de la organizo, tiun preskaŭ milpersonan grupon, kiu per kotizoj kaj donacoj subtenas la agadon de la organizo. La redaktoro de la novajletero de ELNA celas ĝuste tiujn personojn. Li aŭ ŝi konscias ke estas neeble kontentigi ĉiujn legantojn de *Esperanto USA* ĉiutempe. La kaŭzoj

estas pluraj, kaj indas iom komenti la ĉefajn.

La membraron de ELNA (do, la legantaron de *Esperanto USA*) konsistigas centoj da personoj, kies kono de Esperanto estas tre varia, de persono al persono, inter nula kaj akademnivela (kvankam tiu ĉi adjektivo ne diras multon). La aĝoj de la samaj personoj estas de dekelkjaraj ĝis naŭdekelkjaraj, kaj kun la aĝo venas ankaŭ malsamaj emoj kaj inklinoj. Sen enkalkuli la membrojn eksterlande, tiuj loĝantaj en Usono troviĝas en ĉiuj ŝtatoj, kaj—kiel sciata—la kondiĉoj por reklamado, lernado, uzado de Esperanto varias grandskale eĉ interne de la sama ŝtato. La nivelo de la edukiteco de niaj legantoj

estas same varia, ĉu lingve ĉu alikampe. Sama estas ankaŭ la kono de la angla lingvo, se enkalkuli ke pli ol 10% de la membraro de ELNA naskiĝis ekster Usono. Jen, do, nur kelkaj kriterioj, kiuj multe diferencigas niajn membrojn unu de la alia. Provi kontentigi ĉiun el ili per ĉiu numero de *Esperanto USA* estus utopia penado. Sekve, la redaktoro celas per ĉiu numero kontentigi almenaŭ parton de la legantaro, kaj kovri certajn aspektojn de la movado al kiu ni apartenas.

Sed ankaŭ tiu ĉi lasta celo ne estas facile plenumbla de unu sola persono. La redaktoro loĝas kaj vivas plejparton de sia vivo en unu loko, kaj sekve konas pli bone la situacion en tiu loko. Lia aŭ ŝia laboro forte dependas de la kontribuantoj, kiuj estas preskaŭ senescepte ankaŭ legantoj. Redaktoro, kiel la nomo implicas, havas kiel taskon ne verkadon de novajletero, sed ties ĉi redaktadon, en kiu, kompreneble, li aŭ ŝi ne estas ne-subjektiva. Lia aŭ ŝia subjektiveco baziĝas principe ne sur personaj kia-



loj, sed sur redaktoraj. La rezulto de lia aŭ ŝia laboro devas kongrui kun la celoj de la organizo por kiu li aŭ ŝi laboras, ĉu volontule ĉu dungite. Kaj tiuj celoj ja estas ne malmultaj.

Ekde sia komenco Esperanto celis helpi reciprokan interkompreniĝon inter tiuj personoj malsamlingvaj, kiuj tion deziras. Ĝi provas solvi problemojn kreitajn de manko de komunikebleco. Ĉirkaŭ la lingvo kreigiĝis movado, kiu ene de si mem forigis tiun problemon, kaj kiu celas montri al la aliaj, ke solvo ja povas ekzisti pere de Esperanto por la monda Babelo. Por tiuj, kiuj jam lernis la lingvon ekzistas pluraj eblecoj por uzi ĝin. Por tiuj, kiuj lernas la lingvon estas bezonataj materialoj kaj metodoj por atingi kiel eble plej rapide tian nivelon, kiu permesus la uzadon de la lingvo. Por tiuj, kiuj okupiĝas pri la disvastigo de la lingvo, necesas provizi la rimedojn sukcesigi ilian laboron. Ĉiuj ĉi bezonoj/necesoj postulas malsamajn solvojn en malsamaj lingvoj.

Por tiuj, kiuj jam povas utiligi la lingvon senprobleme, la fakto ke periodaĵo aŭ libro aperis en tiu lando aŭ alia apenaŭ gravas tiom longe kiom ili povas ĝui ilin. Por tiuj, kiuj nun lernas la lingvon ne estas malgrava la aperloko de la instrumaterialo, kiun ili uzas, aŭ la klarig-lingvo uzata en tiu instrumaterialo. Por tiuj, kiuj reklamas (aŭ propagandas, se vi preferas) Esperanton, la lingvo en kiu ili faras tion ludas ĉefan rolon. Al ĉiuj ĉi la redaktoro de *Esperanto USA* devas turni sian atenton, kaj al ĉiu necesas provizi taŭgajn materialojn aŭ informojn en la taŭga lingvo. Por tiu, kiu nun lernas Esperanton, lernolibro por parolantoj de la angla apenaŭ utilas, se lia aŭ ŝia lingvo ne estas la angla. Por tiuj, kiuj reklamas Esperanton, ĉe kantona foiro ni diru, materialoj pri Esperanto en Esperanto mem estas senutilaj. Malpli utilaj ol en la svahila, ĉeroka, afrikansa, flandra, aŭ aliaj "ekzotaj" lingvoj, kies parolantoj estas pli facile troveblaj en usonaj kantona foiro aŭ kvartala drinkejo.

Inter la taskoj de ELNA kaj, sekve, de ĝia novaĵletero, estas ankaŭ helpi al tiuj, kiuj instruas aŭ lernas Esperanton, kaj al tiuj, kiuj reklamas ĝin. Informoj utilaj al ili estas ĉefe en nacia lingvo, niakaze, la angla. La novaĵletero (la subtitolo mem diras tion) celas doni precipe novaĵojn kaj informojn, ne instrui la lingvon. Por tio ĉi ekzistas kursoj, instrumaterialoj kaj eĉ periodaĵoj. Antaŭ ol havi membraron, kiu senescepte parolos Esperanton senprobleme, ni devas krei tiun membraron. Al ĝi ni ne povas oferti materialojn nur en Esperanto, ĉar ili ja ne pretus pagi por novaĵletero, kiun ili ne povas legi.

Kiel mi menciis ankaŭ pli supre, la redaktoro pretigas la novaĵleteron el la ricevitaj materialoj, al kiuj laŭnecese li aŭ ŝi aldonas la siajn. Li aŭ ŝi ne estas principe aŭtoro de materialoj, des malpli tradukanto. La materialojn ricevitajn li aŭ ŝi publikigas tiajn, kiaj ili alvenis, post eventuala poluro lingva aŭ stila. Verkante, la aŭtoro supozeble havis certan legantaron en la menso, kiun li aŭ ŝi celis, kaj depende de tiu la elektita lingvo estis la angla aŭ Esperanto. La redaktoro ne povas laŭplaĉe traduki (tradukado estas certgrade speco de reverkado) materialon en alian lingvon, kiun la komence celita legantaro ne nepre komprenus, aŭ ne povus utiligi. Plie, tradukante, la redaktoro aldonus iom da si, lingve kaj stile, tiel damaĝante la originalan verkon. Laŭ mi tio tre gravas. Gravas ke la legantaro konu la lingvajn kaj stilajn kvalitojn de la originala aŭtoro (ĉu estas malgrave kiom bone esprimiĝas niaj propagandistoj sialingve provante diskonigi Esperanton?). Kaj fine, ne malpli grava estas la emo de la aŭtoroj uzi unu lingvon aŭ alian. La redaktoro ne rajtas trudi certan lingvon,

same kiel li aŭ ŝi ne rajtas trudi siajn personajn sintenojn.

La leganto per kies citaĵo ni komencis komparas *El Popola Ĉinio* kaj *Monato* kun *Esperanto USA*. Tio iel aspektas kvazaŭ kompari pirojn kaj pomojn, kiuj ja povas foje simili sed ne povas esti identaj. *El Popola Ĉinio* estas (nesendependa) magazino, parte financata de la ĉina registaro, por propagandi eksterlanden la vidpunkton de la financanto. Malfeliĉe (aŭ eble feliĉe) la usona registaro ne subtenas nian agadon, do nek nian novaĵleteron. *Monato* estas, laŭ la propra difino, internacia magazino sendependa. Ambaŭ periodaĵoj celas internacian legantaron E-lingvan. *Esperanto USA*, kiel organo de nacia E-organizo celas siajn membrojn, inter kiuj kelkaj ne parolas Esperanton. Ĝi similas tiusence al aliaj periodaĵoj Esperantaj, aperantaj en multaj landoj de la mondo. Ĉina Esperanto-Ligo, la eldonanto de *El Popola Ĉinio*, eldonas por siaj membroj la ĉinlingvan *La Mondo*; *La Franca esperantisto*, la organo de la Unuiĝo Franca por Esperanto, estas dulingva, franca kaj Esperanta; *La Brita Esperantisto*, la organo de la Brita Esperanto-Asocio, estas dulingva, angla kaj Esperanta; sama estas *Esperanto sub la Suda Kruco*, la komuna organo de la E-asocioj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando. La listo estas tro longa por daŭrigi. Mi nur volis montri ke *Esperanto USA* per sia dulingveco ne estas unika. Kaj ĝi devas resti tia por esti utila al kiom eble plej multe da siaj legantoj.

Ionel ONET

P.S. Ni ne traktas ĉi tie la alian novaĵleteron de ELNA, *ELNA Update*, kiu celas ĉefe informpetintojn kaj amikojn de Esperanto, kiuj ĝenerale ne parolas Esperanton, sed kiuj interesiĝas pri ĝi aŭ subtenas ĝin.

Passion and Patience

Esperantists tend to be a pretty passionate group. And that's a good thing. Without our deep caring about making the world a better place, few of us would be drawn to the idea of an international language. Without this passion, generations of Esperantists would not have sacrificed so much, and worked the millions of often thankless hours to build and continue our movement. Esperanto would not have survived for more than 100 years without the passionate caring of millions of individuals.

We care about the world, we care about Esperanto, we care about the movement and our friends within it. We care about our projects and ideas, and we care deeply about doing what's right. In general, these too are very positive aspects of our community. It is in the specifics of applying this caring that we sometimes drift off of the moral high ground embodied by the Interna Ideo and begin to descend the slippery slopes of "My Way is the Only Way (MWOW)."

The doctrine of MWOW in the Movado certainly predates the Fundamento. Indeed, this is such a basic human philosophy, that it must have been grafted onto Esperanto very early in our history. It continues to thrive today. You cannot open an Esperanto periodical without reading an article or letter saying that the International Language will succeed "Only when all Esperantists..." accept the viewpoint or support the pet project of the author.

Personally, I favor diversity. Our movement thrives because we act on our inspirations, and don't always follow our leaders like sheep. The movement often benefits from the

myriad ideas and experiments coming from thousands of locations. The Esperanto Way has always been inherently democratic, with everyone trying everything that occurs to them. But our MWOW members sometimes seem to wish for a rigid hierarchy.

MWOW has both an active and a passive side. Passive MWOWism can be seen every time a new idea is suggested. From out of the woodwork come dozens of voices saying, "I don't know what we should be doing, but that isn't it. I'd rather do nothing than THAT!" The active MWOW response rejects all suggestions and improvements, insisting that the initial proposal cannot be changed one iota. Passions flare and action halts.

That doesn't have to happen, even among passionate folks like ourselves. My request is that we try to temper our passion with the patience that is also abundant in our movement. If we can patiently strive year after year for the success of Esperanto, we can learn to be patient with each others' ideas. An active MWOWist who listens carefully may find that some suggestions lead to real improvements. Passive MWOWists may find that there are many benefits to collaborating, even when they don't agree with every aspect of the plan.

I have been guilty of impatience with those who won't accept suggestions. I have too often refused to lend my energies to projects that weren't fully polished. Recently, exercising patience and collaboration has brought me more pleasure from Esperanto than my previous passion for perfection. I suggest that all ELNA members reject MWOWism and take a more balanced approach to the Movado. Only then will Esperanto really progress.

Derek ROFF (Albuquerque NM)
ELNA Vice President

8ema renkontiĝo

La kvara Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista en Ludlow, Vermonto, realiĝis la 11-13an de oktobro. Meze de glorbriila aŭtuna foliaro ariĝis ĉe la agrabla montara feriejo Okemo nekutime diversaĝa grupo de pli ol 70 homoj el kvin landoj. Ĉeestis kiel honorataj gastoj d-ro Claude Piron kaj lia afabla edzino Nicole. Troviĝis prelegoj, kursetoj, librovendado, promenoj, ludoj, muzikado kaj aliaj okupoj. La kultura vespero, sekvante ege bongustan kunmetitan "hazardmanĝon", alportis i.a. lumbildajn programojn, literaturan omaĝon al Edmond Privat, originalan teatraĵon kaj tutgrupan kantplantadon de nappoj. Gitare akompanante sin, d-ro Piron mem regalis per kelkaj kantoj.

En sia dimanĉa ĉefparolado "Esperanto: kiaj perspektivoj?" d-ro Piron bone komprenigis per ekzemploj ke efektive neniu povas antaŭvidi la estontecon de la lingvo. Asertinte ke por la homaro la kreado de E-o egalrangas kun la elpensado de skribistemoj mem, li priparolis la geniaĵojn de sia tre amata lingvo kaj sian profundon kredon ke Esperanto malgraŭ portempaj sortoŝanĝoj neniam povos morti, sed ke samkiel ekz. rilate "arabajn" ciferojn, ĉiuj iam rekonos ĝian superecon kiel komunikilo.

La tuta aranĝo impresis tre granda, vigla kaj diversa, kun multaj infanoj, bonegaj parolantoj kaj seriozaj intereso. Precipe danke al Normand Fleury kaj Zdravka Metz de Montrealo, la ĉiujara afero refoje—kaj aparte bone—sukcesis.

Venontjare OKEMO98 okazos samloke la 10-12an de oktobro.

Bill MAXEY (Powhatan VA)

Report on ELNA's major educational project "Pasporto al la tuta mondo"

Work on ELNA's 15-lesson Esperanto course for video and television is on schedule. The first four lessons have been filmed and are in the process of final editing, and are scheduled to be available for purchase and delivery to prepurchasers in January, 1998. Donations large and small are constantly being received by ELNA and UEA and through other cooperating Esperanto organizations such as Japana Esperanto-Instituto. So far, advance purchases and donations have enabled completion of the first four lessons costing approximately US\$80,000; it is hoped that further financial support from individuals and organizations will bring in the additional \$100,000 needed for the next five lessons, scheduled for filming in July, 1998.

The importance of this educational series has been recognized widely in the Esperanto world; the international Esperanto organization *Universala Esperanto-Asocio* has lent its auspices and support, and the project has been awarded the prestigious "Premio Saliko" worth 20,000 Dutch guilders (about US\$ 10,000) and a grant from the FAME Foundation of 3,000 German marks (about US\$ 1,400). The campaign for further financial support of this important project continues.

For the benefit of educators and teachers, below is reproduced the professional opinion of Derek Roff, Head, Section for Development of Technical Teaching Resources and Materials of the University of New Mexico, about *Pasporto al la tuta mondo*:

"The educational film *Pasporto al la tuta mondo* is based upon the latest

theories of instruction and acquisition of a second language. Current studies show that motivation of the student is most important to effective language learning. An attention-catching tale with coherent and integral intrigue gives the student a framework, a foundation and a visual medium for absorbing and understanding the language. Developing roles and relationships permit a gradual introduction of new lexical and grammatical elements, together with a structured repetition of each element. Liveliness and wittiness hold the interest of the student, who will want to pay attention so as to catch all of the jokes and find out what is happening. The somewhat farcical style not only amuses but relaxes the spectator, and reassures the student about his or her own mistakes.

A second element of current language instruction theory insists on the importance of natural, communicative material. For that reason we avoid the slow


tuta mondo develop between several actors, who are visibly listening, learning and changing their standpoints because of the exchanges at normal conversational speed, exchanges which have significance for them. The avoidance of didactic elements of national languages and on-screen text places the focus on actual live speech.

The use of video tapes permits the instructor or student to repeatedly view scenes and elements to more deeply understand them. Accompanying workbooks and exercises will solidify and clarify the language-instruction materials presented. The workbooks will appear in various national language versions, which will facilitate understanding, study and acquisition of the material by self-study.

The use of modern theory and techniques of language instruction gives *Pasporto al la tuta mondo* the necessary traits to become successfully integrated into different classes and be effective for the widest possible variety of students, including those studying by themselves. This deeply structured and carefully prepared educational system will convince professional teachers and educators, too, that Esperanto is capable of creating, not just adapting, appropriate teaching materials. The solid pedagogic basis and professional production of *Pasporto al la tuta mondo* results in a product that is effective, interesting and worthy of support."

Orders are still being taken for the first 4 lessons at \$85, or for all 15 lessons at \$350. Send orders and/or contributions to: ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA. For more details contact Lusi Harmon at ELNA or lusi.harmon@aol.com.

Lusi HARMON (Oakland CA)



speech and use of an extremely reduced vocabulary found in old-fashioned teaching methods. Likewise we avoid the empty patterns and boring repetition of outmoded instructional dialogues. In contrast, conversations in *Pasporto al la*

Recenze

Kantoj de l' popolo. *Kečka kaj Cantica.* Prago: KAVA-PECH, 1993. Kompaktdisko + broŝuro. Ĉe ELNA: kodo **KAN005**, prezoj: \$13.40 (por nemembroj)/\$12.75 (por ELNA-membroj)

Adeptoj de Esperanto asertas ke ĝi (la lingvo Esperanto) estas plej taŭga kultura perilo, dum laŭ kontraŭuloj, tiu artefarita—do nenatura—lingvo ne kapablas funkcii kiel kultura rimedo. Tiuj ĉi ja pravas: por ili Esperanto ne estas kultura perilo, same kiel aliaj miloj da lingvoj, kiujn ili ne parolas. Tamen, por ni, la malmultaj kiuj parolas la lingvon, ĝi montriĝas jen kaj jen neanstataŭigebla ŝlosilo al aliaj kulturoj. Inkluzive al folkloro, kiu—kiel sciate—estas forte ligita al certa etno.

KAVA-PECH, ĉeĥa eldonejo kaj turismagentejo, volis pruvi al la muzikema publiko, kiu pravas, kaj eldonis en 1993 kompaktdiskon kaj kasedon kun slovakaj muziko. La 27 muzikaĵoj estas dividitaj en du kategorioj: popola (folkloro) muziko (14 pecoj) kaj ĥora muziko (13 pecoj).



Por mi persone la unua parto (la unua flanko de la kasedo) estas pli alloga: mi ŝatas tradician folkloron, precipe kiam oni ludas ankaŭ tipajn (lokajn) instrumentojn. Ĉi tiu muzi-

ka albumo malfermiĝas ĝuste per tia instrumento: slovakaj fajfilego—fujaro, kiun kun iom da fantazio oni povus kompari kun la aŭstralia diĝeriduo (*didgeridoo*) aŭ la rumana *tulnic* (speco de alpkorno), kaj kiu aŭdeblas ankaŭ en aliaj muzikaĵoj. Atente aŭskultante mi havis foje la impreson ke la muzikaĵoj estas hungaraj ("Kiam mi iris", "Venu, venu kun mi trinki", "Hej, tra arbaro"), dum en aliaj oni ja povas aŭdi la hungaran zimbalon (*cimbalom*) ("Junulet', svelta vi") aŭ tipe hungaran duan vilonon (*kontrás*) ("Skribis al mi amatin'"); "Ho, acer'" sonas tiel hungare, ke mi eĉ povas imagi ĝin kiel *Jávorfa* (Acero). Sendube dum la jarcentoj la du kulturoj pruntis unu al la alia, kaj nun estas malfacile diri, al kiu apartenis origine tiu aŭ alia muzikaĵo. Fakte, por amanto de tiaspeca muziko, tio eĉ ne gravas. La protagonistoj de ĉi parto estas la popola muzikensemblo "Kečka" (ĉu hungare *kecske* [kapro]?) sub la estrado de Peter Sarnovský, kiu ankaŭ kantas.

La dua parto (la dua flanko de la kasedo) malfermiĝas per kanto de la ĉi-jarcenta slovakaj komponisto Eugen Suchoň, kiun oni povas facile konsideri patriota kanto: "Mia lando ĉarma". Slovakaj etosoj havas ankaŭ "Ĉe rivero", dum la lulkanto "Violono acera" per sia rekantaĵo *haju* memorigis min pri la "Siberia lulkanto" de Julio Baghy kaj ties *baju*, aŭskultebla sur la kasedo "Al venko!" de József Dinnyés. La fina kanto de la albumo estis por mi vera surprizo: mi ĝin lernis en infanvartejo kiel rumanan popolkanton, eĉ kun la sama titolo: "Dancu, dancu". Kantas ĉi-parte la miksitaj ĥoro "Cantica", dirigita de Božidar Vongrej.

El lingva vidpunkto, tiu ĉi eldonaĵo estas senripoĉa. Tio instigas onin demandi ĉu la kantistoj parolas

Esperanton. Aŭ ili nur papagas, sub la sendube lerta instruado de Petro Chrdle (la posedanto de KAVA-PECH), Joachim Giessner (la tradukinto de la kantotekstoj) kaj Stano Marček (la manaĝero de la registrejo—EMA Records).

Malfeliĉe mankas la originalaj titoloj de la kantoj kaj la nomoj de la soloistoj, tamen la kompaktdiskon akompanas broŝureto enhavanta la tekstojn de la muzikaĵoj.

Persone mi ege ĝuis la jenan perlon de centreŭropa kulturo kaj povas nur esperi ke similaĵoj haveblos baldaŭ el aliaj partoj de la mondo por la muzikema esperantistaro.

Ionel ONET

Povus esti simple. *Persone.* Stockholm: Persone, 1996. CD + booklet. From ELNA: code **POV001**, prices: \$18.90 (non-members)/\$17.95 (ELNA members)

Sometimes Esperantists like to brag about the richness of Esperanto culture, yet feel somewhat ashamed about some of the areas of remaining paucity. Sure, there's plenty of poetry, lots of translated folk songs and a rich vein of social commentary Dylanesque troubadour-with-guitar songs. But serious rock music? Well...

Recently this situation has greatly improved with regard to several styles, including rock'n'roll music. Anyone who has heard the compilation album *Vinilkosmo Volumo 1* will doubtlessly remember the excellent track *Reĝoj de cindro* by Persone. Well, here's the good news: they have a professional-quality CD which includes thirteen tracks of high-energy, high-quality rock'n'roll (actually 12, one is acoustic). This band has been

now, with some changes in its members. Persone has played to appreciative audiences at Esperanto events throughout Europe throughout these ten years. They had previously released two cassettes, but this is their first slick, truly professional quality release. There's plenty of variety within the genre and a wide range of subject matter. Since the band-members all live in Sweden, the subject matter mostly reflects the Nordic sensibility of darkness and despair, punctuated by dreams and longing for warmth, light and love. For example, *Nun mallumas ekstere* includes these lyrics:

Nun mallumas ekstere
 Ene flagras kandel'
 Kaj tra la cerbo kuradas la bildoj
 Staras surtable hotel'
 Mi foliumas senpense
 Tra malnova gazet'
 Kaj ĉi-nokte mi certe enuas
 En la profunda kviet'
 Kial daŭre ŝi mankas?
 Mi ne volas ŝin plu
 Kial daŭre mi aŭdas la voĉon
 Eĉ en kaoso kaj bru'?

This one song is a departure from the others in instrumentation, for it features only a solo acoustic guitar; it is rather like Martin's solo song on *Vinilkosmo Volumo 2*.

There is also serious social commentary. Take for example the beginning of *Reĝoj de cindro* which poetically condemns politicians and other warriors:

Marŝas glora armeo
 Estas la Ĥternulo kun vi
 Subkalkane frakasiĝas la ostoj
 De via malamik'
 Ĉar vi amas la landon
 Vi ĝin savas per mort' kaj teror'
 Forbruligas vilaĝojn kaj urbojn
 Sed mi petas vin:
 Ho, demetu la glavon soifan
 Ĝi jam tiris vin multe tro for
 Vi ne servu la reĝojn de cindro
 Kaj de plor'

The group consists of Anders Grop on electric bass, Bertilo Wennergren on drums and Martin

